



# Bulteno de la Londona Esperanto-Klubo

https://londonaesperantoklubo.com

**Septembro - oktobro 2023**

## Kluba programo:

Septembro:

1. **Raportoj pri partoprenitaj someraj kongresoj fare de la partoprenantoj** [gvidos Klaas kaj Ella el LVS].

2. **Kafo, kuko kaj... Esperanto** (Komuna kafumado, Paddington).

8. **Ĉeesta kunveno en Londono** (Highbury).
15. **La unua universala kongreso en Afriko** (John Magessa).

22. **BEMI-semajno en Esperanto-stacio Halbe, Germanujo** (Eddy Van den Bosch).

29. **Marjorie Boulton: vivo kaj verkoj** (Anna Lowenstein).


Oktobro:

6. **Ĉeesta kunveno en Londono** (Highbury). Prelego de Humphrey Tonkin.

13. **Origamio kaj Esperanto. Ĉu eblas dialogo kaj kunlaboro?** (Larissa Osadchuk).

20. **ILEI, la dekstra brako de UEA - kio ĝi estas kaj kion ĝi faras** (Laura Brazzabeni).

27. **Mil naŭcent okdek kvar de Orwell: 75-a jubileo kaj ĝia aktualeco.** (Giridhar Rao).


## Lokoj, horaroj kaj aliaj informoj:

LEK kutime kunvenas vendredvespere. La duan vendredon de ĉiu monato la kunvenoj estas kutime surlokaj kaj okazas en nia renkontiĝejo en Highbury. La renkontiĝoj komenciĝas je la 19.15h (UTC+1). Aliaj surlokaj kunvenoj okazas de tempo al tempo kaj por scii pli pri tiuj, bv. viziti la paĝon 'events' ĉe nia retejo. La ceteraj vendredaj kunvenoj okazas kutime en la interreto per la sistemo Zoom, kun komenc-horo je la 19h (UTC+1). Ĉiuj klubanoj kaj vizitantoj, proksimaj kaj foraj, povas do ankoraŭ havi la eblon partopreni en la kluba vivo.

Novaj spektuntoj de la interretaj kunvenoj povas peti ligilon al la proksim-vendreda Zoom-renkontiĝo en tiu ĉi paĝo: londonaesperantoklubo.com/zoom.html.

Haveblas ankaŭ, ĉe Jutubo, registraĵoj de prezentoj jam okazintaj. Bonvolu viziti mallonge.net/LEK-jutubo

## Letero

***Ĉu haltigi la boatojn? Ĉu kompreni kial ili ekiras?***

Interalie pri tio debatis la esperantistoj en la ĉi-jara Universala Kongreso. Verdire la kluboj de Londono kaj Antverpeno jam havis prelegon de la reĝisoro de la kongresa temo, kiun oni povas revidi en www.youtube.com/watch?v=bfkxYVnqWBo. La temo estas tre aktuala en Eŭropo kaj ankaŭ en la tuta mondo kaj pri ĝi okupiĝas Unuiĝintaj Nacioj kaj ĉiuj registaroj. La sintenoj varias de "Ni ne volas ilin. Haltigu la boatojn, eventuale eĉ per pafado" al "Ili estas homoj. Ni vidu kiel ni povas helpi."

Vi komprenas , ke la sintenoj al enmigrintoj kongruas kun la politikaj sintenoj de homoj kaj do ne estas eble trovi neŭtralan solvon akcepteblan de ĉiuj. Kiel okazas normale en UEA, ankaŭ ĉijare la konkludo kongruas kun la sinteno de Unuiĝintaj Nacioj, kiuj esence diras, ke oni estu solidaraj kun la migrantoj kaj ne mistraktu ilin. Finfine granda parto de la kaŭzoj de migrado radikas en militoj farataj rekte aŭ nerekte de okcidentaj registaroj [pensu pri Sirio kaj Kongo se vi bezonas ekzemplojn] aŭ en nia deziro manĝi malmultekostajn bananojn aŭ havi malmultekostajn minaĵojn, kiujn ni bezonas por funkciigi niajn poŝtelefonojn.

Ĉiuokaze, jen la rezolucio mem:

***Rezolucio de la 108a Universala Kongreso de Esperanto en Torino, Italujo***

1. La 1 318 partoprenantoj de la 108a Universala Kongreso de Esperanto, kunveninte en Torino, Italio, inter la 29a de julio kaj la 5a de aŭgusto 2023, traktis la temon "Enmigrado – kunfluo de homaj valoroj". La partoprenantoj, alvojaĝintaj el 69 diversaj landoj, ne nur diskutis la temon, sed spertis kaj vivis ĝin: ĉar ĉiuj partoprenantoj parolas la internacian lingvon Esperanto, neniaj lingvaj baroj malhelpis interkomunikadon kaj efektive, konforme al la kongresa temo, la homaj valoroj de ĉiuj ĉeestantoj kunfluis – en harmonia etoso.

Multaj esperantistoj raportis pri propraj spertoj kiel migrantoj. Ili emfazis, ke la scio de la lingvo Esperanto ja helpas por ricevi subtenon en la komenco de nova vivo, sed esenca estas la lernado de la nacia lingvo de la koncerna lando, por povi integriĝi en la socion.

Tio validas por ĉiuj migrantoj – ĉu ili libervole elektis translokiĝi al alia lando aŭ ĉu ili devis fuĝi el sia hejmlando pro milito, mizero aŭ persekuto.

Sekve, la kongresaj partoprenantoj notis jene:

1. La civila socio en la gastiganta urbo Torino donas modelan ekzemplon por la integriĝo de migrantoj kaj precipe rifuĝantoj en la socion.



2. Kun zorgo la kongresanoj konstatas, ke la nombro da rifuĝantoj en la mondo en la pasinta jaro unuafoje superis la ciferon de 100 milionoj. Ni avertas, ke pro la klimatŝanĝiĝo pli kaj pli da homoj estos devigataj forlasi sian hejmon.

3. jNi alvokas ĉiujn ŝtatojn de la mondo ĉesigi la kaŭzojn de malvolonta migrado kaj ni subtenas la klopodojn de Unuiĝintaj Nacioj kaj de la aliaj superŝtataj organizoj mildigi, se ne solvi la problemojn.

4. Ni apelacias al la ŝtatoj, kien venas rifuĝantoj, akcepti ilin kaj doni al ili ĉiun subtenon por povi establi memstaran, liberan vivon. Ni estas konvinkitaj ke migrado fine rezultigas pli riĉan kulturon kaj pli bonstatan socion en tiuj ŝtatoj mem. Ni agnoskas la historian valoron de migrado – migrado estas bazo por la evoluo de la homaro.

5. Ni apelacias al ĉiuj ŝtatoj garantii al migrantoj povi vivi sen lingva diskriminacio kaj sen ajna alia diskriminacio, alivorte: ni apelacias al ĉiuj ŝtatoj sekvi la Universalan Deklaracion de Homaj Rajtoj proklamitan en la jaro 1948.

6. Nun, en la jaro de la 75a datreveno de la akcepto de la Deklaracio de Homaj Rajtoj, ni konstatas kun zorgo ke tiuj rajtoj ne estas respektataj en multaj partoj de la mondo.

7. Tial ni estas solidaraj kun rifuĝantoj kaj ni emfazas, ke la Homaj Rajtoj estas universalaj rajtoj kiuj validas por ĉiu individuo tutmonde, ankaŭ por migrantoj.

Universala Esperanto-Asocio
(en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

Torino, Italio, 5 aŭgusto 2023

***Renato Corsetti***

## LEK-anoj honorigitaj

Laŭ la regularo pri honoraj membroj kaj honoraj prezidantoj, la komitato de Universala Esperanto-Asocio (UEA), surbaze de propono de la estraro, povas aparte distingi esperantistojn, kiuj faris gravajn servojn al la tutmonda Esperanto-movado, per la titolo Honora Membro (HM). Krome, kiel Honora Prezidanto (HP) povas esti nomumita esperantisto, kiu aldone havis eksterordinarajn meritojn por UEA.

Dum sia unua kunsido en Torino la Komitato elektis 3 novajn HM-ojn: Katalin Kováts, **Anna Löwenstein** kaj Privas Tchikpe. Aldone estis elektita unu nova HP: **Renato Corsetti**.


Gratulojn al la du LEK-anoj Anna kaj Renato!

## Nia renkontiĝejo

La surlokaj kunvenoj de LEK okazas unu fojon monate, kutime la 2-an vendredon de ĉiu monato. La venonta kunveno okazos **la 8-an de septembro**. La kunvenejo troviĝas ĉe:
Highbury View, 89 Ronalds Road, London, N5 1XQ (goo.gl/maps/jNtGf5AcG68ogPrq6).

La ejo estas facile atingebla de la metrostacio *Highbury & Islington*. Temas pri pli-malpli 10-minuta piedirado. Por eniri la ejon, oni bezonas enirkodon. Ĝi estos dissendita per retmesaĝo antaŭ la kunveno. Se vi ne havas aliron al la interreto, bv. kontakti la sekretarion (T. 07399 273515) por havi la kodon se vi intencas ĉeesti. Ekster la enirejo estos afiŝo kun kontaktonumero por tiuj, kiuj hazarde alvenos sen la enirkodo.

Kiel atingi Highbury View: **Metroo**: Highbury & Islington (linio Victoria). **Fervojo**: London Overground (Highbury & Islington) kaj Great Northern (Highbury & Islington aŭ Drayton Park). Aŭtobusoj: 19, 263, 271, 30, 43.




## Londona Esperanto-klubo

### Funkciuloj

Honora Prezidanto: Prof. John Wells; Honoraj Vicprezidantoj: Heleno Fantom, Joyce Bunting.

Anthony Bodineau (Prezidanto kaj registristo), Matt Peperell (Vicprezidanto), Arturo Prent (Kasisto), Renato Corsetti (Sekretario), Phil Housley, Alexander Ord, Olga Kerziouk, Julian Nagele, Maria Nagele, Marijus Banaitis (komitatanoj).

Maurizio Giacometto (kompilisto de la Bulteno).